

Heinrich Heine,

[Songante vidis mi vireton]

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*[El "Junaĝaj suferoj - sonĝo-bildoj", IV)*

Songante vidis mi vireton, kiu  
En puraj vestoj marŝis sur ŝose',  
Parade, sed interne estis tre  
Maldelikata kaj malpura tiu.

Interne estis ĝi maltaŭga tute,  
Ekstere tamen plena de dignec',  
Parolis kun aplomb' kaj kuragec',  
Kun afekci', tre spite kaj akute.

Bildaron montris al mi tiu ul',  
Altaron vidis mi en sorĉ-spegul',  
Kaj mi ekkonis, kiu staris tie.

Jen mian karulinon vidis mi,  
Jes-vorton donis al la ulo ĉi,  
Kaj "amen" vokis mil diabloj fie.

*Traduko de la Germana poemo "[Im Traum sah ich ein Männchen]" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-126-1 / Arg-691-1394 (2012-12-03 18:27:32)*